# Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Marto 2003 — 74-a jaro, n-ro 3 (1173)

ISSN 1163.0442 — MENSUEL/MONATA

*Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem*

**http://www.sat-esperanto.org/ *** retadreso: satesper@noos.fr**


# 8a de Marto
# Internacia virina tago



Okaze de internacia tago de virinoj, ni prezentas al vi kelkajn el niaj aktivulinoj.

paĝo 34

**SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI**

## El la redaktejo...



Karaj,
tiu ĉi numero estas parte dediĉita al niaj inaj kamaradoj, kiuj estas grava parto de la SAT-anaro. Okaze de la 8-a de Marto ni uzas la okazon por prezenti al vi kelkajn el niaj aktivulinoj.
Vi povas legi ankaŭ parton el la ricevitaj raportoj pri la manifestacioj kontraŭ la militoj. Espereble alvenos pliaj kaj ili aperos en la aprila numero.
Se vi ne ankoraŭ subskribis la Deklaron de la PK kontraŭ la militoj, tion daŭre eblas fari en la reto (vd. p. 36).
En la lastaj numeroj de S-ulo vi povis legi detalajn kongresajn informojn kaj konstati la riĉecon de la programo. Ne atendu la lastan momenton por aliĝi kaj profiti de tiuj eventoj. Fine, en tiu ĉi numero vi trovas la rezulton de nia referendumo kaj la membrojn de la nova internacia Plenum-Komitato. Dankon al malnovaj komitatanoj kaj bonvenon al novaj. Kamaradece via,

*Redaktoro*

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
*
Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 55€
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
**Commission Paritaire n° AS-74399**
**Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.**

## NIAJ AKTIVULINOJ



Okaze de internacia tago de virinoj, 8-a de marto, nia redakcio decidis prezenti al vi kelkajn el niaj aktivulinoj, kiujn kutime oni ne vidas publike. Tiuj niaj kamaradinoj silente kaj modeste laboras por nia Asocio. Frontpaĝe vi povas vidi iliajn fotojn.

**Unua vico - de maldekstre**:
**Gražina Opulskiene**, litova perantino;
**Zdenka Svetličić**, kroata perantino;
**Elzbieta Janusz**, pola perantino;
**Corrie Kwantes Kooij**, nederlanda perantino;
**Franciska Toubale**, ofta prezidanto de kongresaj laborkunsidoj,

**Dua vico - de maldekstre** :
**Inga Johanson**, sveda perantino;
**Tereza Sabatier**, nia kontistino;
**Erna Döring**, svisa perantino kaj
**Margarita Zelve**, latvia perantino.

Agrablan virinan tagon al ĉiuj niaj inaj membroj kaj legantoj.




*Nova PIV aperis !*
*Akiru ĝin ĉe SAT.*
*Prezo:70 € + afranko*
*Por Francio : 4,27 €, Eŭropo 6,95 €*
*ekster Eŭropo : 10,06 €*

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ
Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

# REZULTATO DE LA REFERENDUMO 2002

Gekamaradoj: Lilio Grandière, René Ballaguy kaj Ron Lynn kribris la alvenintajn referendumilojn (alvenis entute 172 voĉdoniloj) merkrede la 29-an de januaro kun jena rezulto

**POR LA PLENUM-KOMITATO**

| KANDIDATO | JES | NE | SINDETENO | NEVALIDAJ |
|---|---|---|---|---|
| BANNIER | 154 | 7 | 10 | 1 |
| BARKOVIĈ | 170 | 1 | 1 | 0 |
| BUSTIN | 154 | 6 | 11 | 1 |
| CAVALIER | 158 | 4 | 9 | 1 |
| MARKOV | 146 | 12 | 13 | 1 |
| PRENT | 155 | 5 | 11 | 1 |
| SABATIER | 167 | 0 | 4 | 1 |
| SCHRAM | 166 | 4 | 1 | 1 |

**POR LA ĜENERALAJ KONSILANTOJ**

| KANDIDATO | JES | NE | SINDETENO | NEVALIDAJ |
|---|---|---|---|---|
| DUC GONINAZ | 163 | 2 | 3 | 4 |
| LUTERMANO | 137 | 12 | 18 | 5 |
| OLIVIERA | 151 | 2 | 8 | 5 |
| YAMASAKI | 159 | 0 | 8 | 5 |
| PERSSON | 165 | 1 | 1 | 5 |

Sekve al tiu ĉi referendumo, la nova Plenum-Komitato kaj Ĝeneralaj Konsilantoj komencos sian trijaran mandaton la 1-an de marto 2003.
Dum la unua kunveno la novaj P.K.-anoj elektos inter si prezidanton de la P.K.,» kies voĉo estas decida en okazo, se ĉe voĉdono montriĝas egala nombro da por- kaj kontraŭ-voĉoj».
Jam nun la novaj P.K.-anoj distribuis inter si la taskojn pri kiuj ĉiu el ili respondecos.
- K-do Schram - eksteraj rilatoj kun esperantistaj kaj neesperantistaj Asocioj, grupoj, sindikatoj, politikaj partioj.
- K-do Prent : - pri la kongresoj (aktuala kaj estontaj), kontaktoj kun la OKK.
- K-do Markov : - pri eventualaj eldonaĵoj de SAT (kaj reeldonaĵoj), organizado de debatoj kaj kontaktoj kun la Junulfako.
- K-do Cavalier - sekretariado de LEA-komitato, kontaktoj kun LEAoj.
- K-dino Sabatier - kontado kaj kasaj laboroj.
- K-do Barkoviĉ - ĝenerala sekretariado, redaktado kaj aliaj kutimaj oficejaj laboroj.
- K-do Bannier - ekspedo de Sennaciulo Adresaro kaj S.R., Diversaj laboroj kaj riparoj en la Sidejo.
- K-do Bustin - plenumos diversajn taskojn kiuj dum la PK-mandato aperos kaj estos farendaj.